Umberto Broccatelli,

# Eŭropa himno

Kantu kune, amikaro,
ni la ĝojon festas nur,
nek rivero, nek montaro
plu landlimoj estas nun.

Ho Eŭropo, hejmo nia,
tro daŭradis la divid',
nun brilegu belo via,
ĉiu estu via id'.

Via flago kunfratigas
homojn post milita temp',
Via leĝo nun kunigas
civitanojn en konsent'.

De l' Malnova Kontinento,
ĵus ekstaris la popol',
gvidas ĝin tre nova sento,
kaj kuniga forta vol'.

Sub la ŝildo de la juro,
ni vivados en konkord'.
Tio estas nia ĵuro:
unu land' kaj unu sort'.

. . .

Jen ekzemplo por la mondo,
jen direkto, jen la voj'.
Tuthomaro granda rondo,
en la paco, en la ĝoj'.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Umberto Broccatelli *(∗1931-03-05 – †2010-02-11).*

*Arg-900-1795 (2015-02-25 15:02:33)*

*Pluraj versioj de la poemo "Odo al la ĝojo" estas legeblaj en* http://www.poezio.net/version?poem-id=133&version-id=889,264&order=title *. Legu ankaŭ:* http://eo.wikipedia.org/wiki/Odo_al_ДЁojo *. La muziknotoj, laŭ kiuj estas kanteblaj la kanto troviĝas interalie en* http://www.cvnrw.de/download/sing-mit/noten/Ode-an-die-Freude.pdf *.*
*La origina germans teksto de Friedrich Schiller troveblas ankaŭ en* http://ingeb.org/Lieder/freudesc.html *. Tie aŭdeblas ankaŭ la melodio. Pri la verkinto vidu la vikipediejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Umberto_Broccatelli *.*